Filineto

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Aperis vi kiel suneto en mia vivo
De iu venis vi planedo kun beba lingvo
Kaj mi aûskultas ĉiun tagon vian rakonton
pri longaj jaroj da vagado en granda kosmo

Vi sentis vin solece tie, sed vi ne ĝemis
Kaj longa estis vojo via al via hejmo
Sed ni finfine renkontiĝis, animo mia
Nenio povas nin desigi mi certe scias

Vi dormas mia eta stelo sur manoj miaj
Vi estas nekredeble bela, mia filino
Jam vi ridetis en la dormo vi eble vidas
Ke iu bona eta gnomo apude sidas

Mi lasas vin kun via sonĝo kaj fermas pordon
Vin granda kaj feliĉa mondo atendas morgaû
Kaj vi forgesos pri soleco, mia anĝelo
Ja bonan vivon vi komencas sub la ĉielo

Vi kiel ĉarma mirakleto en vivo mia...